

# Esperanto-Brno

## Radio-intervjuo

en Brno la 3.nov.1936

**Vondroušek:** Estimataj aŭskultantoj! Mi havas la taskon intervjui lektoron Henrik Seppik el Tartu, kiu dum novembro kaj decembro gvidos en Brno kursojn de la internacia lingvo Esperanto laŭ la interesa kaj amuza Cseh-metodo. La unua leciono estos vendrede la 6.nov. je la 7.30 vespere en ŝkola na Veverí 28. Morgaŭ vespere je la 7.30 okazos en Osvetovy Dům ĉe U solnice senpaga provleciono, kie sinjoro Seppik demonstros sian instrumanieron kaj al kiu ĉiuj estas bonvenaj, speciale ~~kompreneble~~ la geinstruistoj kaj profesoroj. Similaj kursoj okazos dum novembro k. dec. en Uh. Hradiště k. Uh. Brod. Nun mi prezentos al nia gasto kelkajn demandojn en Esperanto, ĉar li ne scipovas la ĉeĥan lingvon. - Bonvolu diri, kio estas la celo de via restado en Ĉeĥoslovakio?

**Seppik:** Mia celo estas persone konatiĝi kun la ĉeĥoslovaka lando, popolo kaj cirkonstancoj, ĉar jam delonge mi havis grandan intereson kaj simpatian al Ĉeĥoslovakio. Samtempe mi deziras konatigi tie ĉi mian hejmlandon Estonio kaj labori por la disvastigado de Esperanto. ~~La neŭtrala internacia helplingvo.~~

**Vondroušek:** Sed kiamaniere vi povas interkompreniĝi en nia lando, ĉar vi ja ne scias nian lingvon?

**Seppik:** Tre simple: mi uzas ĉiam Esperanton, ĉar esperantistoj ekzistas ĉie kaj ili tre volonte helpas al fremdulo kaj funkcias kiel interpretantoj inter mi kaj tiuj, kiuj ankoraŭ ne scipovas Esperanton. Same mi faris ankaŭ en ĉiuj aliaj landoj, kiujn mi vizitis, kaj ĉie mi sentis min tute kiel hejme per tiu lingvo. ~~Mi havas spertojn, ke per neniu alia lingvo tio estas ebla.~~

**Vondroušek:** En kio konsistas tiu Cseh-metodo, per kiu vi instruas?

**Seppik:** Nu, ĝi estas rekta metodo, sama kiel Berlitz: jam de la unua momento oni instruas rekte en Esperanto, kaj same dum la tuta kurso, kiu daŭras proksimume 15 lecionojn. Lernolibroj ne estas uzataj. La kursanoj bezonas nur paperon kaj krajonon por noti la novajn vortojn. La lernado okazas per interparolado inter la instruisto kaj kursanoj.

**Vondroušek:** Sed kiamaniere vi do instruas la gramatikon?

**Seppik:** Kompreneble ankaŭ rekte en Esperanto, kaj tiel, ke eĉ la plej nekleraj homoj komprenas ĉion. En tio ĝuste kaŝiĝas la sekreto de la instruado! Mi ja ne venus al fremda lando por instrui, se mi ne havus spertojn kaj ne estus certa, ke mi sukcesos. Eble interesas vin aŭdi, ke mia ĉefa celo dum la kursoj estas krei hejmeccan kaj gajan atmosferon, amuzi kaj ridigi la lernantojn. Ĉar kiam la homoj ridas, ili facile kaj plezure lernas. Pli ol unu fojon la kursanoj diris, ke en la Esperanto-kurso estas pli interese ol en kino, kaj kiel mi tion atingas, tion vi povos vidi dum la provleciono kaj kurso.

**Vondroušek:** Ĉu la lernantoj rapide progresas dum viaj kursoj?

**Seppik:** Kompreneble! Jam en la unua leciono homoj, kiuj ĝis nun nenion sciis pri Esperanto,

ekparolas Esperante, post la kvara leciono mi povas pli-mapli libere jam interparoli kun ili pri diversaj aferoj, post la sepa leciono ili povas jam memstare skribi leterojn kaj post la dekdua leciono mi igas ilin skribi „romanojn“. En ĉiuj kursoj mi ricevis multajn tiajn romanojn.

**Vondroušek:** Kiamaniere tio estas ebla? Kiam oni lernas la aliajn lingvojn, oni eĉ post kelkara studado apenaŭ povas memstare skribi leterojn, des malpli iajn „romanojn“, dum vi diras, ke viaj kursanoj jam post la sepa leciono tion faras?

**Seppik:** Tio estas ebla pro tio, ke Esperanto estas multoble pli facila ol iu alia lingvo: la gramatiko estas tiel simpla kaj rektlinia, ke ĝi preskaŭ ne ekzistas, esceptoj mankas, same la idiotismoj, kiuj abundas en la angla, franca kaj ĉiuj aliaj lingvoj, kaj la vortprovizo konsistas el tiaj internaciaj vortoj, kiuj estas al ĉiu konataj jam el la gepatra lingvo: telefono, telegramo, gramofono, teatro, lampo, papero, fenestro, varma, sidi, vidi ktp. La diferenco inter Esperanto kaj la aliaj lingvoj estas same granda kiel inter ĉevalo kaj rapidvagonaro: kvankam ĉevalo estas natura, la artefarita vagonaro veturas tamen multoble pli facile kaj estas multoble pli komforta por vojaĝoj, precize kiel la artefarita Esperanto kompare kun la naturaj lingvoj.

**Vondroušek:** En kiuj landoj vi jam instruis kaj ĉu en viaj kursoj partoprenis multaj homoj?

**Seppik:** Dum 5 jaroj mi instruis en Svedlando kaj Norvegio, kie en miaj kursoj partoprenis kutime 100 ĝis 250 personoj. En la komenco kompreneble ne estas tiel multaj, ĉar ĉie la homoj estas nekredemaj, skeptikaj kaj plenaj de antaŭjuĝoj, kondamnante aferon, kiun ili tute ne konas. Kutime dum la daŭro de la kurso la nombro de la partoprenantoj plimultiĝis kaj en la lastaj lecionoj mi havis ĉiam duoble pli da homoj ol en la unua. Same okazis ĝis nun ankaŭ en Ĉeĥoslovakio. Ekzemple en Košice estis en la komenco nur 60 kursanoj, sed en la fino jam 160.

**Vondroušek:** Kiomn longe vi jam restis en nia respubliko kaj kiel plaĉas al vi ĉi tie?

**Seppik:** Printempe mi estis en Ĉeĥoslovakio 4 monatojn kaj nun denove jam pli ol 1 monaton. Al mi tre plaĉas tie ĉi, ĉar la lando estas belega, la popolo afabla kaj kultura. En multaj rilatoj Ĉeĥoslovakio similas al Skandinavio kaj ofte al mi ŝajnis, ke mi estas en Svedlando. Kiam mi revenos hejmen al Estonio, mi volas tie labori por la konatigo de la demokrata kaj kultura Ĉeĥoslovakio.

**Vondroušek:** Ĉu vi volas rakonti al ni ion pri via hejmlando Estonio?

**Seppik:** Tre volonte! En Estonio ni jam venkis la krizon kaj nuntempe la ekonomia vivo estas pli vigla ol iam antaŭe kaj travivas altan konjunkturon. Senlaboreco ne ekzistas. Ankaŭ la politikan krizon, kiun ni travivis antaŭ kelkaj jaroj, ni jam venkis, kaj en decembro okazos la elektoj de la nova konstitucia parlamento. La ceteron mi diros per alia internacia lingvo - la muziko. Por tio ni ludos per gramofono du melodiojn, luditajn per malnovaj popolaj instrumentoj de simplaj kamparaj maljunuloj. Unue vi aŭdos la tielnomatan „tabanmuzikilon“. (~~Gramofono 2.A. nr. 1 Labajalg „Siūsāu-sāu“~~). Due ni prezentos alian estonan popolan muzikilon - sakfajfilo. (~~Gramofono 1.A. nr. 2 „Räditants“~~).

**Vondroušek:** Mi povas diri, ke tiaj samaj popol-instrumentoj estas konataj ankaŭ en nia lando.

**Seppik:** Mi kredas. Kaj krom tio ankaŭ en multaj aliaj landoj. Tio montras, ke la popoloj ne estas spirite tiel malproksimaj unu de la aliaj, kvankam inter ili staras la altaj kaj fortikaj lingvaj muroj, kiuj apartigas ilin unu de la aliaj same kiel la granda ĉina muro devis apartigi la ĉinan landon kaj popolon de la cetera mondo. ~~La rezulto de tiu apartiĝo estis la stagnado en la evoluo de la ĉina popolo kaj kulturo. Ni esperantistoj deziras, ke ĉiu popolo konservu siajn apartaĵojn kaj sian~~

lingvon, kiun oni uzu en interrilatoj kun samnaciaĵoj, sed apud la gepatra lingvo ĉiu ellernu ankaŭ internacian helplingvon por interrilatoj kun aliaj popoloj. ~~Preĉipe por la malgrandaj popoloj estas tre grava, ke ili ne bezonu lerni la malfacilajn kaj komplikajn lingvojn de kelkaj grandaj popoloj, sed ke ekzistu nacie neŭtrala kaj facila helplingvo, kiun oni povas rapide perfekte ellerni kaj per kiu ĉiuj popoloj povas senti sin egalaj. Kaj post tio oni lernu ankaŭ diversajn naciajn lingvojn, se oni havas bezonon, tempon kaj monon por tio.~~